Let us take a simple illustration, "Rome the Gauls shall conquer." Even the adult might well be excused if he is at a loss to decide the accusative in such a phrase; but the stupidest child will readily see the difference between—"Romo venkos la Gaŭlojn," "La Gaŭloj venkos Romon," "Romon la Gaŭloj venkos," "La Gaŭlojn Romo venkos," k.t.p., after being told the meaning of the inflectional "n," and however the order of the words may be changed he easily picks out the accusative, and afterwards is led on to recognise the "usage" in English which has taken the place of the more visible inflectional form. I would like to continue the illustration at greater length, showing how the child might through Esperanto be helped to realise the meaning of mood and tense, and the inflections for number and person, together with many useless irregularities in verbal forms, but I fear the Editor's blue pencil,

What Esperanto means to the Blind.

It is possible that in the progress of your every-day life you have met only a few blind persons, and those you have met belong to a class which inspires more of pity than respect. From this you have concluded that the blind are numerically an insignificant people. Unfortunately this is an erroneous conclusion, for in every 1,000 of the population all over the world there is one person, man, woman, or child.

For ages this class, so peculiarly thrown in upon itself, shut in the darkness and uncertainty which never lifts, without education, without occupation, was forced to lead a life of aimless idleness. It is just a century since the great idea of reading by touch occurred to the helpers and lovers of the blind, and we are, so to speak, still in the Infant Department of the Learners' Great School.

All over the world, in every land, there is now a group of blind people who have risen above the level, and are striving with all the powers in them to draw upwards their fellow sufferers. To these any idea, any means, that will lend them aid in their task is most welcome!

The principal difficulties to be overcome are these :—

1st—The tremendous cost of producing books for a class so limited in numbers and means,

2nd—The isolation of the individual blind, which is the natural result of their blindness, and

3rd—The isolation of the communities of blind people, as found in schools, workshops, and asylums.

To the removal of all these difficulties Esperanto has already contributed something, and it needs no prophetic gift to see that in the future the international language is to do much, very much more.

To speak of the topic of books. The blind of each country are a small company compared with the sighted, and their capacity for buying books is now measured by their numbers. High cost is the consequence, and this is the same in every country. Great sums of money are being spent in England, France, and Sweden upon the printing of books in Braille type, in each national tongue, whereas one Esperanto version would serve for all.

With the development of the study of Esperanto some at least of this waste will be saved, and we shall have cheaper books, and cheap books are the very foundation of education.

Then it often happens that the blind man has a taste for languages, but he finds few books to help him, few grammars and dictionaries, unless he copies out one for himself, with incalculable labour. But he can easily learn Esperanto, for, thanks to the efforts of Prof. Cart and others, he can buy both in the international language, and with this common ground he can easily begin the study of any language by correspondence. I know several men who have learned a new language in this way.

The educated blind, man or woman, highly appreciate the insight into the literature of a foreign nation. Each language has its characteristics in the literature, and by a perusal of the thought-colouring of other people's language a broader outlook is obtained.

Now we come to the second difficulty blind people have to face, viz., isolation of the individual. They are sprinkled about all over the countries, some in remote country villages, some in the alleys in our large towns, many of them leading very lonely lives, without an interest to keep "Hope" alive in them.

Deprived of the newspaper and of the magazine, and with but a limited number of books, they frequently turn themselves to correspondence. It is impossible to express to you how much Esperanto means to such as these, for all over the world the moderately educated blind have seized upon this form of education and pleasurable recreation.

There is now, between hundreds of people who have never touched hands, a rapidly growing friendship, which brings happiness and good cheer into lives where these letters are as veritable rays of sunshine.

Even if the happiness of these individuals were the only blessing it had bestowed, Esperanto would have justified its existence.

The third difficulty consists of the isolation of blind communities.

In almost every institution or society working for the good of the blind there is some original thinker, by whom ideas could be made of value to the class. There has been in the past a great lack of knowledge concerning the methods used for the amelioration of the condition of the blind in other lands.


Correspondence has been limited by the bounds of language ; hence many useful inventions and splendid ideas have remained utterly valueless to all but the few hundreds in some little spot on the globe.

This ignorance, however, is beginning to vanish before the presence of Esperanto. The workers amongst the blind all over the world are showing a lively desire to learn what is being done elsewhere, and constantly we receive enquiries from foreign countries asking for details of the work in our own land.

By means of Esperanto already blind people all over the globe are being brought into touch with each other. Already we have had seven international annual Esperanto Congresses held in seven different countries, at all of which many blind Esperantists have assisted, travelling long distances at considerable expense in order to participate in the advantages of an international Congress. Journalists, authors, teachers, musicians, are all eager to meet their fellows from other countries, and as they have one common tongue in which to express themselves, there is no bar to their communications.

We are urgently in need of helpers who will Braille books for use of the blind. Will you help us now that you know what Esperanto means to the blind ?

ALFRED JNO. ADAMS,
Plynlimmon Terrace, Hastings.



The Uses of Esperanto.

To the Manufacturers.

In these days of keen competition and "cut" prices it is an absolute essential to success that each business man should give careful consideration to any method which may possibly, either directly or indirectly, tend to lessen the working expenditure of his undertaking. The latest types of machinery, with a greater output capacity, newer means of transport, ensuring quicker and safer delivery, each attract his attention and receive his careful consideration, as means whereby he may be able to produce his wares equal in quality and at as low a cost as any in the market. To lower the cost of production occupies a great portion of his time, and happy is he when he discovers some new method of economising in his factory. And yet even low cost of production, vastly important though it undoubtedly is for ultimate commercial success, would be of little value unless at the same time suitable methods are being devised for the introduction of the manufactured articles into the markets of the world. To depend on purely local trade is to court disaster, and an entry into foreign markets is essential to success. This, as one will readily understand, is a matter of great expense, and is often the cause of small manufacturers being compelled to confine their trade to the markets of their own land. To advertise his goods is the first step towards this world-wide connection, and this brings him face to face with the great difficulty of the diversity of languages. His catalogues, compiled at great expense,

are practically worthless beyond the limits of his own country, and to compile a new one for each country, even of only one continent, would entail greater expense than the possible returns may justify, whilst the compilation of lists for each and every country in the world would be financially impossible. Consequently, even though his wares be of universal utility, the great language difficulty presents an insurmountable barrier for the manufacturer, and he finds his field of action limited to possibly two or three of the foreign countries, and even then the increased expenditure is often found to have taken away the greater part of the profits from the increased turnover of manufactured goods, as each country demands a separate set of lists, etc., for successful working. Consequently, any method which would both open out the world's markets and at the same time reduce the cost of the necessarily increased advertising of the goods, would be of great value to the enterprising manufacturer, and should receive his careful consideration. Various methods have from time to time been suggested for attaining this end, but little or no success has hitherto attended these efforts, chiefly because the greatest difficulty of all, namely the language difficulty, has been left severely alone. Consequently, believing that by it that difficulty is overcome, Esperanto is suggested to manufacturers as a sure means of introducing their goods into lands other than their own. It has been found to be a practical solution of the international auxiliary language question at the eight congresses held yearly in various European and American cities. By means of one catalogue, printed in Esperanto, and enclosed with it one of the splendid series of national "Keys," people of any nationality are able, without previous knowledge of the language, to understand the meaning of the ordinary phrases to be found in the lists. The Universal Esperanto Association (U.E.A.), a society founded for the practical usage of this language, is now represented in about 900 cities, in 43 different countries. The consuls appointed by this association will give their assistance to any manufacturer requiring information or help in the compilation of such a catalogue, etc., or in any way to further commercial relations between the countries of the world. Esperanto can safely be said to have passed beyond the experimental stage, and to have taken its place amongst the practical aids to international commerce. Many firms, both in Great Britain and on the Continent, have already tested and proved the efficiency of the language, and speak with praise of its effectiveness and cheapness in the matter of the opening of foreign markets for their goods. To test it should be the decision of every manufacturer who is determined to increase his sales by the widening of his field of commerce, and once tried he will become convinced of its utility and its suitability. A list of consuls, delegates, etc., who would be willing to give their aid to manufacturers may be had on application to the Secretary British Esperanto Association, 133, High Holborn, London.—N. W. ROBERTS in the "Rotherham Express."



Esperanto in China.

The U.E.A. publishes the following interesting information from its *Delegate* in SHANGHAI, S-ro K. C. San:—"In CHANG CHOWFU (Amoy) an Esperanto group has been founded, and all the members have joined the U.E.A. The group in MOUKDEN, founded seven months ago, now has 300 members studying the language. The local theatrical company is giving daily performances in aid of the group funds. It is no wonder then that the Moukden District with its 82 U.E.A. members for 1912 is now in the van, and

advises *Delegates* in other districts to counterbalance this 'yellow danger' with equal figures on their part!"

The staff at the Central Bureau of the U.E.A. in Geneva does not find the registration of its Chinese members as easy matter! Most of the names begin with Ĉ and end with N. Here are a few specimens:—Sinjoroj Ji Ci, Ĉen Ĉin En, Cen Cuo Ji, Ĉen Lie Tue, Jan Cin Cin, Cen Cun Hien, Cen Mu Son, Ĝen Min, etc., etc. Most of these Chinese *samideanoj* are either teachers with their pupils, or business men.—The SHANGHAI *Delegate* now publishes a small propaganda review, *La Mondo*. Specimen copies may be had, five for one reply-coupon, on application to S-ro K. C. San, 683, Myburgh-road, Shanghai.



English or Esperanto?

While we are by no means sad at the continual spread of English throughout the world, we still think there is room for Esperanto, and think, too, that Esperanto—in existence as yet for hardly twenty-five years—would stand one in good stead in many places where English would be of very little use. Support of this view is afforded by the Russian Esperantist Directory recently published in Moscow. Analysis of its contents reveals the fact that Esperantists are already to be found in five hundred and thirty-two different towns and villages in Russia!—from Archangel in the North to Tiflis in the South, from St. Petersburg in the West to Vladivostock in the far distant East of Siberia. Of this number fifty-seven are in Russia-in-Asia, as many as twenty-three being in the Turkestan district. And the names here given by no means exhaust the whole of Esperantodom in the land of the Czars. They merely come from those who have taken the trouble to send in to a central bureau particulars as to profession, dwelling-place, etc. As the publishers say, the statistics obtained, remarkable as they are in themselves, are still more encouraging when one considers that there are certainly very many Esperantists unconnected with any general organisation. Another thing that strikes one on looking through these lists is the way Esperanto has permeated all classes of society. One finds here representatives of practically every profession: teachers, soldiers (from general down to simple private), postal officials, university professors, merchants, doctors (particularly numerous these), book-sellers, publishers, lawyers, priests, bank officials, labourers, artificers, technicians, clerks, printers, police officers, etc. etc. Very promising is the way, too, in which the language has been taken up in the schools both by teachers and pupils. The names of students—both girls and youths, and grammar-school boys and girls—are to be found almost on every other line. What material here for the building of a real palace of peace among the nations! We recommend our teachers and scholars to take advantage of some of these addresses for purposes of international correspondence. Esperanto would make the geography lesson something of really living interest! Surely it is time our schools began to make use of the educational possibilities of Esperanto? One year at the auxiliary language would give results unattainable for most children after five years' study of French or German. And work at Esperanto would not diminish the interest in foreign languages; on the contrary, the actual interest aroused in foreign lands and their peoples through correspondence would often lead to a wish to know still more of a particular country, and teachers of French and German—who might also teach Esperanto, if they would!—would find many of their pupils ready to specialise in one of these languages, and much more enthusiastic and capable of real practical work than heretofore.—W. M.

Natura Evoluado.

Volapük pereis ĉefe pro *unu* grava eraro... : *absoluta manko de natura evoluipovo*; kun ĉiu nova vorto aŭ formo la lingvo devis konstante dependi de la decidoj de unu persono aŭ de facile inter si malpaonta personaro.

D-RO L. L. ZAMENHOF ĉe la Sepa Kongreso.

Ofte D-ro Zamenhof ripetis, ke unu el la ĉefaj kaŭzoj de l' pereo de Volapük estis, ke ĝi dependis de la decidoj de unu persono aŭ de komitato, kies tasko estis ellabori la lingvon. Tute prave S-ro Edm. Privat siaflanke diras tre elokvente, ke nur la esperantista "popolo" donas vivon al Esperanto : *vivanta* lingvo de *vivanta* popolo!

Tre grave do eraras tiuj, kiuj dezirus lasi ekskluzive al la *Lingva Komitato* la zorgon, krei la vortaron de nia komuna lingvo aŭ de la literatura, kiu estas nur supera formo de la komuna. Neniu Akademio, eĉ se ĝi konsistus el eminentaj lingvistoj, el geniuloj, sukcesus en tia laboro, ĉar tiu ĉi sola estas kapabla, krei la *gustan* vorton, kiu ĝin nepre bezonas por esprimi ideon, kiu sin trudas al lia spirito. La kreanto de la lingvo — kaj tio ĉi estas tiel vera por Esperanto, kie por ĉiu ajn alia *vivanta* lingvo — estas kaj povas esti nur la popolo, *kiu ĝin uzas*, nur la verkisto, *kiu proprinspire ĝin skribas*, ne por traduki vortojn de alia lingvo sed sian penson. Jen la viva fonto, el kiu, *cetere tre malmultaj*, sprucas la novaj vortoj. Tute genie D-ro Zamenhof volis, ke, unufoje kreita, lia lingvo vivu la saman vivon, kiel ĉiuj ceteraj lingvoj.

Se kelkafoje el tio rezultas ia superflueco iom malkvietiga, ni ne tro timu, kaj ni ne serĉu tie pretekston, por forigi la liberecon de l' verkisto, kondiĉon mem de vivo, nek, kompreneble, por trouzi kaj malbonuzi tiun ĉi liberecon, kun la kaŝita intenco, naski libermortigan reakcion.

Sed la neforprenda libereco havas de si nedisgeblajn malbonajojn, kiujn oni ne povas nei, kaj pri kiuj oni malprave riproĉas la naturan evoluadon.

Kiamaniere ni korektos ilin?

Unue per tio, ke ni certigos la liberecon de la kritiko, kies rolo estas montri kurage la malbonan uzadon de la libereco, por tiamaniere plimalgravigi ĝiajn bedaŭrindajn sekvojn.

Ni, poste, fidu la *Lingvan Komitanon* kaj ĝian *Akademion*, kies devo estas konservi la ordon, kondiĉon de l' progreso, kaj certigi, dank' al la fideleco al la *Fundamento*, la internacian unuecon, motivon mem de nia ekzisto. Se ĝi malrapide laboras, ni ne estu severaj : la L.K. estas nur "moderigilo" kaj "reguligilo," kaj tio sufiĉas. Oni lasu al ĝi la necesan tempon por plenumi kun certeco la tre delikatan taskon, konstati la uzadon kaj, per oficialaj decidoj, ĝin normaligi... kaj sian taskon ĝi plenumos.

Fine, *precipe*, antaŭ ĉio, ni forigu tiun ĉi ne-

duban dangeron pri anarchio, per interna, memvola, plej severa disciplino, inspirante al ĉiuj personiaj ekzemploj per nia instruo, la profundan respekton al nia lingvo, respekton, kiu estas ne nur gentileco, sed vera devo kontraŭ la amaso de la ceteraj ĉiunaciaj Esperantistoj, kaj malpermesas, ke ni uzu esprimojn, kiujn ili ne komprenas ; ni forigu tiun ĉi dangeron, ripetante al ĉiuj — eĉ akademianoj, kaj al ili kiel al la aliaj, — ke la rajto krei vorton estas tute *escepta*, kaj ke tiu ĉi sola ĝin havas, kiu nature pensas en Esperanto kaj tiel profunde scipovas, "posedas," la lingvon, ke li ne plu faras el ĝi simplan tradukilon de tio, kion li diras en sia gepatra lingvo !

Kiam ĉiuj estos vere konvinkitaj, ke necese estas, gisfunde koni ĉiujn ecojn kaj rimedojn de Esperanto, antaŭ ol enkonduki iun novajon, ke oni devas rilatigi la lingvo kun sama modesteco, kiel honestulo rilatas al la malnovaj naciaj lingvoj, kiam ĉiuj ĉesos vidi en la genia eltrovojo de Zamenhof ian artefaritan jargonon, kiun oni rajtas ŝangi aŭ pliriĉigi laŭ la kaprico de la individua "logiko," tiam ni ne plu bezonas timi kelkajn dekliniĝojn, ŝulditajn al la libereco de la natura evoluado, sen kiu, kiel skribis D-ro Zamenhof, estas nur pereo.

Ni respektu nian lingvon kaj postulu de ĉiuj saman respekton por ĝi !

Jen la grava tasko de la propagandistoj, instruistoj, jurnalistoj, tiom pli grava, kiel pli granda estas ilia influo.

Resume : Volapük pereis ĉefe, ĉar la evoluado de la lingvo estis kontraŭnatura, dependanta de iu persono aŭ komitato.

Saman eraron evitos Esperanto, dank' al sia natura, libera evoluipovo ; sed alia eraro ekzistas, kiun ĝi devas eviti.

Se ĝi siavice iam pereos, tio ne okazos pro aŭtokrata agado de la L.K., nek ankaŭ pro vorta aŭ afiksa nesufiĉeco, sed pro emo ĉe kelkaj al tro rapida pliriĉigo kaj pro diversnacia superflueco.

Kontraŭ tiu ĉi antaŭvidebla kaj jam ekzistanta dangero, la Akademio tute prave konsilas al la Esperantistaro "en kies manoj nepre restas la sorte de nia lingvo, ke ĝi uzu kun la plej granda modereco sian povon enkonduki kaj, per uzo, aprobi novajn vortojn. Estas ĉies devo, — ĝi aldonas, — antaŭ ol uzi novan vorton, zorge konstati, ke ĝi ne estas superflua, alivorte, ke ĝi ne estas anstataŭebla per taŭga vorto, ĉu fundamenta, ĉu almenaŭ tre ĝenerale uzata."

Tiun ĉi konsilon ni ĉiuj aŭskultu, kaj precipe ni, jurnalistoj, ĉar, en tia afero, grava estas nia respondeco.

Ne por ni ni skribas, sed por la aliaj.

Ne por ni ni parolas, sed por la aliaj.

Ne por ni ni laboras, sed por la aliaj.

TH. CART, en "Lingvo Internacia."

La termonumentoj apud Krakovo.

De JAN MEDRKIEWICZ (*Krakovo*).

Krakovo, la iama ĉefurbo de sendependa Polujo, estas la plej antikva urbo de Pollando. Ĝia komenco perdiĝas en nebuloj de pasintaj jarcentoj, pri kiu konserviĝis en nia tempo neniaj certaj sciigoj. Nur mitaj rakontoj pri la legenda princo Krakus aŭ Krak kaj princino Wanda, al kiuj popola fantazio kaj tradicio atribuas la fondon de Krakovo kune kun konserviĝintaj historiaj dokumentoj, permesas diveni, ke la komenco de Krakovo apartenas al VIIa aŭ VIIIa jarcento post Kristo. Pri Krak la popola tradicio rakontas interesan legendon :—

Terura kaj sangavida drako ekloĝis en kaverno proksime de Krakovo. La drako de tempo al tempo estis forlasanta sian malluman sidejon, proksimiĝadis al homaj hejmoj kaj rabis, por nutri sin, ne nur dombestojn, sed ankaŭ homojn. Malgraŭ konstanta ĉasado kontraŭ tiu terura besto, la loĝantaro ne sukcesis liberiĝi de ĝi; kontraŭe la drako kuraĝigita per la prosperado de siaj rabekskursoj fariĝis vera malbeno de la ĉirkaŭaĵo. Tiam kuraĝa princo Krak decidis mem batali kontraŭ la besto, por liberigi de malfeliĉo siajn regatojn. Li preparis grandan sakon kun sulfuro kaj eksplodaj substancoj interne. Alportinte ĝin al la kaverno de l' drako, la princo sukcesis trompi la beston kaj ĝi forglutinte la sakon post kelka momento krevis pro la interna fajro. La ĝojigita kaj feliĉa loĝantaro estis tiel danka al sia heroa princo, ke post lia morto, ĝi eternigis lian nomon, manĝutinte laŭ sia antikva slava kutimo grandegan termonumenton. Tiu termonumento konstruita sur supro de la monteto, ĉe kontraŭa al la urbo bordo de la Vistulo, bonege konserviĝis ĝis nia tempo kaj estas ĉiamā celo de multaj promenoj, kauze de ĉarma panoramo de Krakovo kaj de tuta ĉirkaŭaĵo, videbla el supro de tiu termonumento.

Koncerne la princinon Wanda, ankoraŭ hodiaŭ, la apudkrakovaj vilaĝanoj rakontas la sekvantan :—

Post morto de la princo Krak heredis la tronon lia solfilino Wanda. Si, belega laŭ la eksterajo, sian tutan amon oferis al la popolo kaj volis resti virgulino. Sed alvenis dangera tempoj por ŝia kvieta kaj terkulturista popolo. El mallumo de okcidentaj arbaregoj eliris homoj, armitaj per ŝtalaj glavoj, vestitaj en feraj kirasoj. Parolis ili per ia lingvo nekonata, kaj regis inter ili granda obeemo kaj ordo. La slava popolo nomis ilin "Niemcy," kio signifas "mutuloj," kaj tiu vorto vivas ĝis nun kaj signifas Germanojn. Kauze de tia germana invado komenciĝis longedaŭraj bataloj. La princino Wanda sian popolon al ili kondukis persone kaj kiam fine la cirkonstancoj devigis

sin, sieĝatan de malamikoj en la kastelo Wawel, subiĝi kaj oni prezentis al ŝi kondiĉon edziniĝi kun germana princo, ŝi tion rifuzis kaj dronigis sin en la Vistulo.

La bravecon de sia princino, la popolo honoris ankaŭ per alta termonumento, kiu troviĝas apud la Vistulo en ĉarma bosko 7 klm. de Krakovo.

La antikva kutimo honori naciajn heroojn post ilia morto per termonumentoj estas ĉe la slavaj popoloj, precipice ĉe Polo, tre populara. Ĝi vere estas simbolo de amo kaj adoro por la heroo ne nur flanke de potenca reĝo aŭ registaro, aŭ iaj sociaj klasoj, sed ĝi simboligas amon de la tuta popolo, de la nacio, ĉar ĉe konstruado de la termonumentoj ne laboras salajrataj laboristoj, sed kunvenas de ĉiuj flankoj, personoj de diversaj sociaj sferoj kaj propravole kaj proframane ŝutas tiun originalan kaj daŭran monumenton.

Dum pli ol dek jarcentoj la Polo neniu honoris per tia amsigno; nur en komenco de XIX. jarcento denove eksplodis amo de la tuta popolo vekita de la "heroo de du mondoj" al kiu same danke konstruis monumentojn Usonanoj kiel Polo, ĉar por libereco de du diversaj kaj malproksimaj respublikoj li batalis.

Mi parolas pri Tadeusz Kościuszko (Tadeuš Kościuszko). Al li nome antaŭ kelkdeko da jaroj konstruis Polo termonumenton apud Krakovo, kiu laŭ sia grandeco eĉ superas tiujn de Krakus kaj Wanda.

El supro de Kościuszko-termonumento vividos belegan panoramon de urbo Krakovo, kvazaŭ sur manplato, kaj intre de ĉio la Vistulon argente brilan, kiu serpentumas apud la reĝa kastelo Wawel, la ĉenon de mezgrandaj kupolaj montoj, kovritaj de arbaro, el kiu elkreskas grandioza kun multaj turoj monaĥejo "Bielany"; se vi havos akran vidsenton vi rimarkos kontraŭ Bielany sur la alia bordo de Vistulo imponajn ruinojn de antikva abatejo Tyniec el XI. jarcento; se vi traflas favoran veteron, se la aero estas pura, kaj la nubo levigas alte supren, tiam de la Kościuszko-termonumento vi bonege vidos en suda direkto du montĉenojn: Beskidon okcidentan kun ĉefmonto Babia góra (Virina monto) kaj Tatrojn, plej altaj montojn post la Alpoj, kun pli ol 50 pintoj, de plej originala kaj kruda aspekto. Se vi estas turisto aŭ tiel nomata "mont-grimpulo," la aspekto de ĉi tiuj montaroj tiel vin forte influos, ke vi nepre ekdeziros ekkoni pli proksime la Beskidon arborecan kun centjaraj diktrunkaj pinoj, abioj, piceoj kaj fagoj aŭ la rokaj Tatrojn, kie granitaj amasoj formas plej originalajn figurojn, fendojn, abismojn, malfacile trapaseblajn ŝtonvojetojn, kiuj kondukas al montsuproj, kie nur agloj havas siajn nestojn, kie aŭdiĝas longedaŭra fajfado de marmotoj

kaj kraketa piedfrapado de salte kurantaj ĉamoj aŭ cervoj. Kaj iomete malpli supre vi vidos lagojn, borderitajn amfiteatre de ŝtonmuroj, kie la akvo pura kiel kristalo, malvarma kiel glacio, havas neesprimeble ĉarman koloron bluan, verdan aŭ safiran.

Ho, ne vane, la ĉefa el tiuj monttagoj estas nomata Morskie Oko (Mara Okulo).

El ĉiu lago elfluas rivereto; ili rapide kuniĝas por baldaŭ disgutiĝi, dispolviĝi, brue falante en abismojn, kiun sur sia fluvojo ili devos trapasi.

Tiaj vidaĵoj vin certe forte impresos, kaj ilin vi nevole imagos al vi observante Tatrojn aŭ Beskidon el Krakovaj termonumentoj.



(Por Komencantoj).

La koloro plej amata de Dio.

De JOHN H. WOOD.

Granda bruego okazis en la infana ĉambro antaŭ kelkaj tagoj. La kaŭzo estis birdeto, ruĝagorĝo, kiu saltis sur la fenestran breton por montri al la infanoj sian ruĝan veston.

— Mi scias, kial ruĝagorĝo havas ruĝan bruston, diris Riĉo, kun scianta mieno.

— Mi ankaŭ, diris Bob — estas por varmigi al si la bruston en la vintro. Mi portas ruĝan flanelon sur la mia nun.

— Tute ne, rimarkigis Riĉo — estas ĉar Dio plej amas la ruĝagorĝojn; do Li donis al ili Sian plej amatan koloron.

— Ruĝo ne estas Lia plej amata koloro, kontraŭdiris Monjo: — Dio plej amas bluon; la ĉielo ĉiam estas blua.

— Ĉiam blua! ridis Riĉo riproĉe; — jen, ĝi ne estas blua nun; ĝi estas griza... sensenculo. Ruĝa estas la plej bona, ĉar la ileksberoj estas ruĝaj, kaj soldatoj, kaj fragoj, kaj...

— Vi ambaŭ estas malpravaj, interjetis Bob — flavo estas la plej amata de Dio koloro. Kian koloron havas sunlumo?

— Ne estas ia sunlumo nun, diris Riĉo.

— Kaj kian koloron havas ranunkuleto? daŭrigis Bob.

— Mi tute ne respondos, eljetis Riĉo, piedbatante la plankon.

— Kian koloran havas miozoto, ekkriis Monjo, kies favorata estis en dangero.

— Jes, sed kian koloron havas papavo? interrompis Riĉo, kiu decidis, ke oni ne superos lin. — Dio plej amas ruĝon.

Ne, tute ne, ekscite diris Bob, — Li certe plivole elektus flavon.

— Infanoj, diris la patrino, kiu eniris rapide — kial tiu ĉi terura bruego?

— Nu, diris Bob, trankviligante — nia Riĉo diras, ke ruĝo estas la koloro plej amata de Dio, kaj Monjo diras, ke bluo estas, sed mi diras, ke flavo estas.

— Ĉu vi ne konjektas, ke blanko estas la koloro plej amata de Dio? demandis la patrino.

— Rigardu la puran neĝon en la ĝardeno. Pensu pri la cignoj, kaj...

— Kelkaj cignoj estas nigraj, interjetis Riĉo, preskaŭ malgentile. Li ĵus lernis pri Aŭstralio.

— Nu, daŭris lia patrino, — pensu pri la beletaj blankaj lekantetoj.

— Jes, sed lekantetoj havas flavan koron, ekkriis Bob.

— Kaj ili havas ruĝajn pintojn, aldonis Riĉo.

— La okuloj de la infaneto estas bluaj, diris Monjo; — kaj mi plivole havus ilin, ol lekantetojn.

— Eble ni devas audi, kion paĉjo diros, sugestis la patrino.

— Hura! ni demandu al paĉjo, ekkriis Ricjo.

— Li diros la veron. Ruĝo ja estas la koloro.

— Ĉu vi kverelas pri koloroj? demandis la patro... — Kion pri ili?

— Kiun el ili Dio plej amas? — ili ekkriis ĥore.

— Atendu momenton, diris la patro. Li revenis kun triangula vitropeco, kiun li nomis prismo.

— Nu, infanoj, diris li, — kian koloron havas la neĝo?

— Blankan! ili diris, nevoleme, timante, ke la patrino malgraŭ ĉio estas prava.

— Kiu faris ĝin blanka?

— Dio, respondis la infanoj, ankoraŭ pli nevoleme.

— Nu, rigardu ĝin tra tiu ĉi prismo, Riĉo. Kian koloron nun havas via blanka neĝo?

— Ĝi estas ruĝa, kaj flava, kaj blua, kaj... kaj ĉiuj koloroj, li diris, ĝojigite.

— Sed el kie venis tiuj koloroj?

— Mi ne scias, krom... krom ili estas en la blanka neĝo, diris Riĉo, penseme.

— Vi ne estas tute malprava, respondis lia patro. — Vi vidas, ke viaj tri koloroj estas necesaj por fari la neĝon blanka; do, Dio devas pensi, ke ĉiu estas egale aminda.

— Dio, do, amas ĉiun kiel plej bonan, diris Monjo.

— Tute vere, diris la patro. — Do, kiam panjo kolektas siajn galantojn, kaj Monjo siajn miozotojn, kaj Bob siajn ranunkuletojn, kaj Riĉo siajn papavojn, mi esperas, ke vi ne forgesos, ke ĉiu el ili estas amata de Dio. Sed estas io, eĉ pli grava.

— Kio? ili demandis.

— Se vi renkontos flavan Hinon en la strato, aŭ nigrulon, aŭ Hindon, memoru, ke Dio donis al ili ilian koloron ankaŭ, kaj amas ilin tute same, kiel li amas la blankulojn.

*EL CHRISTN. COMMONWEALTH, * trad. W. M. PAGE.*

* The Christian Commonwealth (weekly 1d.) contains each week a paragraph in Esperanto, with contributions by well-known foreign Esperantists.

Ankoraŭ pri la Principoj de la Kanttraduko.

La plej perfekta kaj la plej malfacila por ludi muzika instrumento estas la homa voĉo. Voĉa muziko, t.e. kantoj, konsistas el 2 ĉefaj partoj : vortoj kaj muziko. La plej perfekta formo de voĉa muziko estas tiu, en kiu estas kunigitaj plej perfekte, laŭ ĉiu vidpunktoj, la vortoj kaj muzikaj tonoj — aŭ plej perfekte "edzigitaj" por tiel diri.

Antaŭ ol traduki kantojn kun sukceso, oni devas havi iom ĝustan ideon pri la kantarto, kaj ĝustan komprenon de la relativa graveco de l' vortoj kaj muziko. Ŝajnas al mi, ke estas ĝuste en tio ke F-ino Young iom eraras en siaj du artikoloj aperintaj en la BRITISH ESPERANTIST.* Si komencas kun — ŝajnas al mi — ne tute ĝusta koncepto de voĉa muziko ; aŭ eble estus pli ĝuste diri, kun nur unuflanka koncepto.

En la laste aperinta artikolo ŝi komencas per la laŭ mi, neprava diro, ke oni kantas ne pro la vortoj sed nur pro la muziko. Do, kial havi vortojn, se ili nur ĝenas ; kial ne forigi ilin tute kaj anstataŭigi per taŭgaj vokalaj silaboj, kiel en la komenco de l' lernado de la kantarto? Kio fariĝus, mi demandas, ekzemple, la majstra "Messiah" de Handel sen vortoj? Gi ja perdis sian preskaŭ tutan valoron kiel granda ĉefverko de oratoria kaj voĉa muziko.

"Vortoj estas nur metodo eldiri la muzikon." Ne, ne, mi protestas. La vortoj mem plej ofte inspiris la muzikon kaj nur malofte la muziko la vortojn. Traduko konsistas en rearango de la *ideoj* en la vortojn de alia lingvo, por taŭge kuniĝi kun la muziko ; dum la muziko mem estis, plej ofte, komponita por taŭge kuniĝi kun la *originalaj* vortoj. Oni rakontas, ke, dum Handel estis komponanta "He was despisèd" ("Comblé d'outrages"), amiko eniris la ĉambro kaj trovis lin ploranta. Tio ne estis kaŭzata de la muziko, sed de la vortoj mem, kaj ili inspiris la majstran muzikajon, kiu estas la muzika esprimo de l' larmoj. Cetere, kelkaj kritikis la Handelan akcenton sur la vorto "was" anstataŭ sur "He" ; sed la tuta oratorio estas pri *Li*, kaj Handel tie volis elstarigi la *staton*, ĝis kiu Li humiliigis. La akcento sur *was* egalas *estis ja*.

La supozo ke "la akcentita silabo de vorto devas ĉiam lokiĝi sur la akcentita takto de la muziko" ne estas eraro sed nura gvida *bazo* aŭ teorio ; kaj, same kiel oni povas ŝangi la akcentitan takton mem (per sinkopado, k.c.) ne ŝangante la bazan ideon de l' akcento, same oni povas agi pri la koïncido de l' akcento ĉe vortoj kaj muziko. Gi ne estas rigida, netuŝebla, aŭ

nevaria lego. Plie, ankaŭ en la parolata lingvo akcento sur antaŭlasta silabo estas nur bazo kaj povas esti aliaj *pli malfortaj* akcentoj sam, tempe.

Mi konsentas ke, en tradukoj, oni ne devas tro insisti pri nuancoj de certaj vortoj ; sed oni nepre *devas* uzi la vortojn laŭ *gramatika* ĝusteco ; kaj, pri tio, mi rimarkas eraron en la traduko de "Quand tu chantes," en la lasta verso, antaŭlasta linio, kie estas uzata *veku* anstataŭ *vekiĝi*. Cetere, tiu kompatinda verbo multe suferas en angla lingvo ; oni uzas "to wake," "to awake," kaj "to waken," "to awaken" egale, transitive aŭ netransitive, dum korekte la formoj en "en" estas ĉiam *transitivaj* kaj la aliaj *netransitivaj*.

Mi ne volas kredigi, ke mi tute malkonsentas kun la artikoloj de F-ino Young, ĉar en ili, mi pensas, estas multe da vero, sed mi kredas, ke ŝi tro insistas pri la muziko, iom ignorante la vortojn kaj forgesante, ke ili ambaŭ formas kune unu harmonian tuton. Mi ja pensas, ke oni devas havi pli largajn principojn, ol ĝis nun, kaj en tio mi tute konsentas kun ŝi.

Estas multeco de muzikaj formoj ; sed, por nia celo oni povas krude dividi kantojn en du klasojn. En la 1^a estas :

Neregulaj kantoj, pli malpli recitatovaj.

Regulaj kantoj pli malpli ariaj, t.e. komponitaj aŭ tute neregule aŭ tute regule laŭ muzika vidpunkto. En la dua klaso troviĝas kombinoj de tiuj en la 1^a, kaj ili estas :

Recitativo kaj Ario.

Miksitaj (pli malpli neregule) Recit. kaj Ario.

Oni konstatas, ke, en Recit., pro la muziko mem, ne estas necesa la *rimo*, tamen kelkfoje oni havas ĝin eĉ en tio ; dum, male, en ario, preskaŭ ĉiam estas necesa la rimo por doni agrablan kaj dolĉan finiĝon al la kuniĝo de vortoj kaj muziko ; tamen, eĉ en ario kelkfoje oni povas nehavi la rimon. Do, ĉu oni havas rimon aŭ ne *dependas sole de la karaktero de l' muziko*, al kiu estas kantotaj la vortoj. Sed ke oni devas tute neatenti la rimon mi ne konsentas ; ĉar mi ja konstatas, ke, kiam oni aŭdas kanton, estas la reguleco de la rimoj, ofte, kio plaĉas al la orelo preskaŭ tiom, kiom la muziko mem. Plie, se oni ne atentas rimon laŭ la reguloj de F-ino Young, preskaŭ ĉiu verkaisto povus traduki kantojn ; sed, vere, ĝi estas ne tiel facila, kaj efektive bezonas multe da talento kaj lerteco por ricevi bonan tradukon. Siaj metodoj taŭgas por recit. aŭ kvazaŭ-recit., sed malofte por ario. En kelkaj kantoj la tute speciala karaktero de la muziko preskaŭ nuligas la rimon en kantado, se tio ekzistas en la poezio, kaj tiaj povus esti tradukataj laŭ ŝiaj reguloj.

* Vidu B.E., Sept., 1911, p. 169.

Mi opinias, ke oni farus bone uzante, kelkafoge, la italan metodon kun vortoj kiel "via," "mia," k.c., kantante ilin kiel nur unusilabajn vortojn anstatau du. Ankaŭ same ĉe kombinoj kiel donu al, iru al, kantante la "u a" kiel unu silabon kaj laŭ unu noto. Cetere, tio jam estas farita en angla lingvo, ekzemple, en la horajo "And the Glory of the Lord" el "Messio," ankaŭ en "Blessing and honour, glory and power" el la sama verko, oni kantas *glory of* kaj *glory and*; la sama metodo estas ankaŭ uzata en la "Hallelujah" horajo, por ne paroli pri esprimoj kiel "Th' Eternal God" en kelkaj niaj himnoj. Sed tiu principio devas esti uzata *kiel eble plej malofte* kaj nur en okazo de *besono*, kaj kiam ĝi donas plaĉan kombinon al la orelo, ne malklarigante la sencon de l' vortoj.

Nun ni konsideru kelkajn ekzemplojn de kantoj diverstipaj. Unue mi volas preni ekzemplon de la glora Handel, kiun oni povas prave nomi la Ŝekspiro de voĉa muziko. La kanto "Ombra mai fù" ("Handel's Largo") estis originale verkita laŭ italaj vortoj en lia opero "Xerxes"; ĝi konsistas el Recit. kaj Ario. Jen la vortoj en itala, angla, kaj esperanta lingvoj:—

Recit. Frondi Tenere
Tender foliage
Dolça foliar'.

Aria. Ombra mai fù
No sylvan shade
Kara ombrej'.

Handel.

Recit.
Frondi tenere, e belle,
Del mio platano amato;
Per voi risplenda il fato;
Tuoni lampi e procelle,
Non v'oltraggino mai la cara pace;
Nè giunga a profanarvi, austro rapace!

Aria.

Ombra mai fù
Di vegetabile,
Cara ed amabile,
Soave più.

Recit.

Tender foliage waves o'er me,
'Neath my sycamore resting;
Its boughs glad omens are murmur ring.
Hail and lightning, frost and tempest,
Come not near this dear tree, this peaceful shelter;
And mayst thou ne'er disturb it, dread blast of winter.

Aria.

No sylvan shade
Such fragrant coolness sheds,
Such radiant branches spreads,
In wold or glade.

Recit.

Dolça foliar', kareta,
Bela ombra verdarbegó;
Vi igas sorton beleta;
Hajlo, fulmo, frost', ventego,
Arbo kara, ne vin malrankviliĝu;
Terura vintra vento, ĝin ne mortigu.

Aria.

Kara ombrej',
Sub via belfolian',
Plej dolça en arbar',
Jen ripozej'.

En la itala, rimarku ke oni kantas *cara ed*, kie la *a e* kombiniĝas en unu silabon. Legante la anglan tradukon, oni povas konстатi, ke ĝi estas ne malpli bela, ol la originala itala. Tio montras, ke, kelkafoge, traduko povas esti pli ol nura seka traduko, sed povas esti vere nova bela majstraĵo. En la esperanta traduko notu, ke "via" estas kantata kiel nur unusilaba vorto.

Ekzemploj de kantoj, en kiuj la foresto aŭ forigo de rimo kripligus kaj malbeligus ilin estas:—

"Caro mio ben," "Angels Ever Bright and Fair," "I am a Roamer," Liddle's "Abide with Me," "With thee th' unsheltered moor I'd tread" (Handel's "Solomon"), k.t.p. En "Angels Ever Bright" rimarku kiel efika estas la bela fluanta kaj rima ario post la antaŭanta recit.; tie oni atendas la rimon por kompletigi la belan arion.

Ekzemplo de miksa neregula kanto estas "She alone charmeth my sadness," de Gounod, kiu komencigas per pura Recit. kaj sekvas per bela ario, interrompita de alia peco de Recit.

Por montri, ke traduko povas esti tute regula laŭ literatura vidpunkto kaj, samtempe, esti tute konforma al la muziko, ne perdante la sentojn de la originalo mi aldonas tradukon de la bone konata "Promise of Life."

LA PROMESO DEL VIVO.

En ĉiu kant', el la de ni kantataj,
Ĉeestas noto plena je dolor';
Ne estas roz', el la de l' jar' portataj,
Sen iu dorn' vundanta ĝis la plor'.
La rozoj ne la tutan jaron restas;
Neniu tag' sen propra la lacec';
Sed ni kantadas, kaj felicaj estas,
Promenas kaj forgesas pri pluvec'.

Ho! ni kantadu! eĉ se larmoj restas;
Florojn kolektu, spite la pluvad';
Sur nia ter' nenio daŭra estas,
Sed perfektigas en ĉiel' vivad'.

Al ĉiu iam la okul' blindigis,
Per larm' de l' zorg' aŭ kompatema sent',
En ĉiu koro ofte memorigis,
Okaze, pri pasinta ĝoj' aŭ tent'.
Ne estas viv' sen sia dolorego;
Ne estas ja sen sia zorg' anim';
Sed en la kor' estas esperego
Pri la morgaño bela kaj sen tim'.

Do! tra mallum' ridetu ho okuloj;
Koro preĝadu meze de l' bruad';
En la ĉiel' por ni, kun la sanktuloj,
Ĉiam perfekta estos ripozad'.

Dō, laŭ tio, kion mi diris, sekvas ke, resume, oni povas starigi la sekvantajn regulojn:—

Ke traduko estu rima aŭ ne, laŭ la karaktero de l' muziko.

Ke oni fortranĉu la "o" de substantivoj, kaj la "a" de la artikolo, *kiel eble plej malofte*, kaj nur en okazo de bezono.

Ke estu permesate, konsideri vortojn kiel "mia," "via" kiel unusilabajn, laŭ itala metodo; sed nur en okazo de nepra bezono.

Ke, kiam unu vorto finigas per vokalo kaj la proksima komenciĝas ankaŭ per vokalo, la du vokaloj, laŭ la itala metodo, kuniĝu por esti kantataj sur la sama noto de la muziko; sed tio nur en okazo di nepra bezono.

J. ARNOLD HODGES.

Himno antaŭ la Sunlevigo en la Valo Chamouni.

De S. T. COLERIDGE.

Ĉu vi sorĉilon posedas haltigi la stelon
matenan
Sur ĝia vojo dekliva? Ĝi sajnas jam longe
surresti
Kapon teruran nudan vian, ho reĝa Mont-
Blanka!
Arvo kaj Arveirono, riveroj ĉe via piedo,
Fluobruadas freneze; sed vi, terurega Formo!
Vin levadas el via maro silenta da pinoj,
Kiel silente! Cirkaue, supere de vi en aeron
Disetendiĝas profunde nigra malluma solida
Maso ebona. Ekŝajnas al mi, ke vi tion trapikas
Kiel per kojno! Sed kiam mi tien denove
rigardas,
Ĝi nur estas la propra hejmo via trankvila,
Via sanktejo kristala, via loĝejo eterna!
Ho timeginda silenta Monto! Al vi mi rigardis
Ĝis vi ankoraŭ restante de miaj okuloj vidata,
Tamen el penso la mia forpasis: mi, en preĝado
Kvazaŭdrone, adoris solan la Nevideblan.

Sed, simile al dolēa mallaute sonanta muziko,
Tiel dolēa, ke oni aŭskultas ne tion sciante,
Vi kun mia medito dum intermisiĝis
Jes, kun mia la vivo, kun mia sekreta vivgojo:
Ĝis la tro plena anim' envolvite, transeverse,
En la vidaĵon la grandiozegan pasante, tie
Kiel per sia natura formo vastigis ĉielon.

Ho animo vekiĝu! Ne nur silentan adoron
Vi alſuldas: ne sole tiujn ĉi larmojn fluantajn,
Mutan dankemon, sekretan ekstazon! Vekiĝu
en vivon

Voĉo de dolēa kantado! Vekiĝu ho koro!
Verdvaloj
Kaj krutajoj glaciaj himnon mian kunkantu!

Vi, unue kaj ĉefe, de l' valo la sola reganto!
Vi batalanta kontraue mallumon dum tuta la
nokto,
Vi vizitata la tutan nokton de aroj da steloj,
Aŭ leviĝantaj zeniten aŭ horizonten irantaj.
Vi kamarado en horo tagiĝa de l' stelo matena,
Stelo vi mem rozkolora de l' tero kaj de la
aŭroro
La kunheraldo! Vekiĝu, vekiĝu kaj laudon
eldiru!

Kiu kolonojn mallumajn profunde en teron
enplantis?
Kiu plenigis vizaĝon vian per lum' rozkolora?
Kiu estigis vin patro de ĉiam fluentaj riveroj?

Vi kvin torrentoj sovaĝaj, furioze ĝojantaj!
